Heinrich Heine,

Alvenas generacioj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Alvenas generacioj
Kaj ree iras for;
Sed ne formortas la amo
estanta en mia kor'.

Nur unufoje, mortonte,
Mi emus revidi cin
Kaj diri al ci surgenue:
"Mi amas vin, sinjorin'!" [2]

Traduko de la Germana poemo "Die Jahre kommen und gehen" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-510-1003 (2010-02-11 11:57:47)

Mi, Manfred Retzlaff, uzis en mia Esperantigo la pronomojn "ci" ka "vin" por redoni tion, ke la poeto uzis en la lasta linio la germanan prepozion "Sie", per kiu oni alparolas fremdajn personojn. Sonas tio iom ironie aŭ moke. La poeto faris tion verŝajne intence por distancigi sin iom, kvazaŭ ŝerce.

[2] aŭ eble:
"Madame, mi amas vin!";
ĉar ankaŭ en la germana-lingva originalo troviĝas la franca vorto "Madame".